



El Popola Ĉinio

Aktualaj Novajhoj

Esperantujo

- [esp-novajhoj](#)
- [kalendaro](#)
- [korespondi deziras](#)
- [lernado](#)
- [historio de esperanto](#)
- [kiu estas kiu en e-ujo](#)
- [forumo](#)
- [radio](#)
- [e-organizoj](#)
- [amuzejo](#)
- [e-literaturo](#)

Socia Vivo


- [vivo de chinioj](#)
- [kalejdoskopo](#)
- [aktuala temo](#)
- [sporto](#)
- [junularo](#)
- [moroj](#)

China Kulturo

- [kulturo tradicia](#)
- [literaturo](#)
- [pentrajho](#)
- [muziko](#)
- [arkeologio](#)
- [metiarto](#)
- [kino](#)

Ekonomio

Statistiko pri fishkvanto de Ĉinio estas fidinda



La 17-an de decembro Yang Jian, estro de la Fisha Buroo sub la Agrikultura Ministerio de Ĉinio, diris al ĵurnalisti, ke estas korekta la fishkvanto, publikigita de Ĉinio, kiu neniam troigis sian fishkvanton por anonci al la internacia socio.

La 29-an de novembro, Reg Watson kaj Daniel Paulty, kanadaj sciencistoj, publikigis traktaton en brita magazino "Naturo", kie ili diris, ke de 1980 Ĉinio raportis sian fishkvanton pli altan ol ghi efektive estis kaj pro tio la materialoj publikigitaj de la Nutrajha kaj Agrikultura Organizo de UN pri la fishkvanto de la tuta mondo montris, ke kiam la fish-richfontoj en la tuta mondo malkreskis kontinue, sed la fishkvanto kreskis, tiel ghi erarigis la internacian publikon pri la fish-richfontoj de la mondo.

Yang Jian diris, ke la china statistiko pri fishkvanto estas farita rigore lau la "Legho pri Statistiko" kaj "Statistika Regularo" sankciita de la Nacia Statistika Buroo, sed ne tute konformas al la specimena esplorado għenerale praktikata internacie. Li diris, ke kompreneble la china statistiko estas ne perfekta, tial la china registaro volonte perfektigos għin kunlabore kun koncernaj departementoj de la internacia socio.

Yang diris ankaŭ, ke en la pasintaj 20 jaroj la kresko de la fishkvanto de Ĉinio estas vera. Ĉar la akvoproduktajhoj estas unu el la varoj, kies prezo estis shanghata lau la merkata bezono, tio multe ekscitis la fishadon. La nombro de la chinaj fishshipoj kreskis de 49 mil en 1980 al 280 mil en la pasinta jaro. Nun fishado restis unu el la profitodonaj entreprenoj en la china agrikulturo.

La china fishado havas siajn proprajn trajtojn. Ĉar ĉinoj kaptas ankaŭ krabojn kaj meduzojn, kiujn ne volas multaj evoluintaj landoj, tial la fishkvanto de Ĉinio entenas ankaŭ tiun de kraboj kaj meduzoj, kaj la kalkulado de la du kanadoj ne konformas al la efektiva stato de Ĉinio.

La china registaro chiam alte taksas protektadon de la fishaj richfontoj. Ĉiujare Ĉinio praktikas 2-3-monatan marblokadon. Ĉi-jare 130 mil grandaj chinaj fishshipoj ne plu faras fishkaptadon, kio koncernas pli ol milionon da

- [informoj](#)
- [investo](#)
- [investa politiko](#)
- [lokaj produktajhoj](#)
- [entreprenoj](#)
- [entreprenistoj](#)

fishistoj.

Yang diris fine, ke en 2000 la fishkvanto de Chinio malpliighis je 1.35% kompare kun tiu en 1999 kaj chi-jare la fishkvanto mallevighos pli multe. Pro rigora limigo de la fishshipoj, ekde 1998 la nombro de fishshipoj ne plu kreskis. En la venontaj 5 jaroj lau plano Chinio reduktos la fishshipojn je pliaj 30 mil.

Vojagho tra Chinio

(12/19/2001)

- [chinaj urboj](#)
- [vidindaj lokoj](#)
- [itinero proponita](#)
- [restoracioj](#)

Libroj

- [recenzoj](#)
- [rekomendo](#)
- [libroj de China E-Eldonejo](#)

Amikaj retejoj

- [El Popola Chinio](#)

Amikaj rilatoj

(C) China Internet Information Center (China Interreta Informa Centro)
E-mail:webmaster@china.org.cn Tel: 86-10-68996214/15/16